



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 165

Januaro 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto  
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto  
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto  
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:  
Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



## GELERTO

fare de Marjorie Boulton



am pasis ĉirkaŭ sepcnt  
jaroj,  
sed vivas historio  
pri Flueleno fajrakora,  
Princo en Nord-Kimrio.

Karan princinon trovis li,  
kaj amis ŝin konstante;  
sed kiam frukto sekvis florojn  
ŝi mortis jam, naskante.

La fajra kor' de Flueleno  
cindriĝis pro doloro;  
sed baldaŭ lia brava bebo  
iĝis la ĉeftrezoro.


Pro patra amo fajra koro  
denove noble ardis;  
sian fileton pli ol tronon  
li plej atente gardis.

Ĉevalojn, falkojn kaj ĉashundojn,  
Stale, aŭ kaĝe, hale,  
li havis belajn; unu hundon  
li amis speciale;

hundo tre saĝa kaj kuraĝa,  
lojala kaj kun lerto,  
la favorat' de Flueleno  
estis la hund' Gelerto.

Li diris, "Portu!" — Fulme for!  
"Gardu!" kaj jen rigido;  
"Defendu! — saltis tuj al mord',  
inda de plena fido.

Kaj Flueleno fajrakora  
restis en fera certo  
pri fere fiksa fidindec'  
de tiu hund', Gelerto.





Ĝis unu tagon al ĉasad’  
Li iris en trankvilo,  
dirinte, “Sidu! Jen,  
Gelerto,  
gardist’ de mia filo!”

Kontenta, gaja, ĉasis li  
Plezure sub sunbrilo,  
revenis laca al palaco,  
kaj kuris al lulilo —

Ektremis princa lipo, kaj  
Kret-palis princa vango —  
sur la kovrilo de la bebo  
ankoraŭ likvis sango,

Kaj sango plakis sur la planko —  
kaj ruĝis kiel averto  
sur la muzelo kaj la dentoj  
de lia hund’ Gelerto.

Jen fajre flamis venĝo-febro —  
li lasis la lulilon —  
“Satana hundo! Judasbesto!  
vi manĝis mian filon!”

Gelerto levis sian kapon,  
rigardis lin demande;  
sed Flueleno premis lin  
plate al planko, plande —

“Mortu, bestaĉo! Al diablo!  
Mortu en via perfido!  
Estu ofero al infero,  
murdint’ de mia ido!

Vi kuŝos inter la fatraso,  
sur vi la ratoj feku!  
Putru odore, senhonore,  
birdaĉoj vin disbeku!”

La princo tiris sian glavon —  
“Vi pagu mian infanon!”  
Gelerto en la lasta movo  
lekis la glavon manon.

Jen Flueleno piedbatis  
la mortan hundon, “Fi!”  
kaj jen sub la kovriloj ruĝaj  
eksonis beba kri’.

La princo kuris, palpis, prenis,  
brakumis la princeton;  
“Ĉu eblos tamen savi vin?  
Ho Dio, aŭdu peton!”

Traserĉis li korpeton karan,  
trovis nenian vundon;  
“Ho ĝojo! — Sed de kie, do,  
sango sur mian hundon?”

Kaj via lulilo sangoplena?  
Ja estis ia krizo!  
Ho kio?” Tie, post lulilo,  
granda kaj fremda grizo...

Jen kuŝis lupo granda, peza,  
pli ol Gelerto forta,  
tamen kun gorĝo elŝirita  
en sango kuŝis morta.

Kaj Flueleno fajrakora  
filon al koro tenis,  
dankis la savon, ĵetis glavon —  
kaj ĉion li komprenis.

“Ho Dio! Kion faris mi?  
Ho kora fajro troa!  
Gelerto, mia kara hundo,  
fidela kaj heroa!

Vi havos tombon plej honoran  
kun gravurita ŝtono —  
sed por la vivo forpikita  
ne eblas ia redono!


Jes, Flueleno regis, kaj  
amegis sian idon,  
kaj tamen li neniam plu  
aŭdigis gajan ridon.

Jam pasis ĉirkaŭ sepcent jaroj  
sed daŭre sango ruĝas  
kaj ni erare kaj misfare  
daŭre tro haste juĝas.

Ankoraŭ multaj kiel Gelerto  
restas lojalaj ame,  
kaj ofte fine lojaleco  
estas pagita same.

Por nobla revo, pela devo,  
fidele ni batalu;  
pagos doloro, fendiĝos koro,  
— kaj tamen ni lojalu.

— Dankon al Marjorie Boulton. Ŝi  
konis la historion de Gelerto ekde  
infanaj jaroj, sed rememoris ĝin  
dum la Brita Esperanto Kongreso  
en Newport, Kimrio, kaj verkis la  
baladon, laŭ malnova stilo, por  
deklamado en unu kunveno de la  
kongreso.



La historio eble  
estas esence vera;  
sed ekzistas aliaj  
versioj pri fidela,  
misjuĝita besto:  
ekzemple en hinda  
legendaro aperas

lojala mungoto, kiu mortigis  
serpenton.

**Ekzistas monumento al Gelerto en  
la kimra urbeto Beddgelert,  
Kimrio.**

**La verkistino sekvis la kutiman  
historion, sed aldonis unu detalon:  
ke la patrino de la bebo jam  
mortis. Ŝi esperis, ke tio aldonas  
emocion, sed ankaŭ klarigas  
praktikan punkton: se la princino  
vivus, ŝajnus normale, ke ŝi restu  
apud la ankoraŭ eta infano.**



## OKAZAĴO EN AŬTOBUSO

Bela amikino mia ĝuis sole vojaĝi.  
Ŝi estis, kaj ankoraŭ estas,  
kuraĝulino. Iam ŝi volis viziti  
prahistoriajn urbetojn en Turkio. Ŝi  
devis veturi per antikva aŭtobuso.  
Kiel kutime, ŝi kunportis sian  
monsakon, valizon, kaj botelon da  
pura akvo. Ŝi jam lernis, ke oni  
devus porti sian propran akvon, kaj  
ankaŭ, ke bela virino devas gardi  
sin kontraŭ malvirtaj viroj.

Kiam ŝi eniris la aŭtobuson, ŝi  
rimarkis ke ĝi estis preskaŭ plena.  
Ŝi sidiĝis en seĝo apud fenestro.  
Baldaŭ viro sidiĝis apud ŝi en  
la lasta libera seĝo. Post kelkaj  
minutoj la viro provis kapti ŝian  
atenton, kaj murmuris ion fremd-  
lingve. Mia amikino ne rigardis al la  
viro, sed glitetis pli proksimen al la

fenestro. La viro tuŝetis kaj timeme provis frapeti ŝian brakon. Mia amikino fiksrigardis tra la fenestro. Denove li hezite murmuris. Ŝi ne rigardis lin sed diris, "Mi neniam parolas kun fremduloj." Li persistis. Ŝi diris, "Bonvolu ne ĝeni min."

Post kvardek minutoj la aŭtobuso haltis ĉe bushaltejo. Mia amikino stariĝis kaj provis preterpasi la sidantan viron. Sed la viro tuj ekstariĝis kaj vidalvide montris al ŝi sian pantalonon. Dum la tuta veturo la botelo da akvo, kiun ŝi portis sur la brako, gutadis kaj malsekigis ĝin.

Efektive mia amikino, kiu parolas la anglan, diris al mi ke la viro sendube parolis la turkan. Tamen, en ĉi tiu kazo ne helpus eĉ Esperanto!

— Prenda E. Cook

Noto de la redaktoro: Se Esperanto ne helpus, eble helpus malpli da suspektemo aŭ pli da fidemo en la afableco de fremduloj, eĉ viroj.



Kiel iam diris Rudyard Kipling, "Mi ĉiam preferas kredi la plejbonan pri ĉiu homo -- tio ŝparas tiom multe da tempo."

Ni multe dankas al Prenda pro ŝia kontribuaĵo



1an de januaro, 2000

Estimata Redaktoro:

Oni diris, ke mi devas pretigi por la jaro 2000, sed nenio okazis. Nun mi havas grandan amason de ladskatoloj manĝaĵplenaj, kandeloj, alumetoj, piloj, ktp. Mia demando estas, ĉu mi iom post iom eluzu ilin, aŭ ĉu mi konservu ĉion ĝis la jaro 3000?

Mi ĉiam alte taksas vian konsilon.

Kon Fu Zita

Estimata konsilo-petulo,

Fordonu la manĝaĵojn. Tro multaj homoj en la propra komunumo ne havas sufiĉajn manĝaĵojn por la nuna monato. Ju pli vi donacas, des pli vi spirite riĉiĝos. Pri tio mi almenaŭ ie aŭdis.

Via redaktoro



**Ne forgesu pagi por nova abonjaro por resti "Inter Ni"!**